

PENSEO

N-ro 236

Jun. / 2011

Monata Beletra Revueto en Esperanto
Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 22-a jaro <http://www.elperno.cn/penseo/penlisto.htm>

Anteo (Ĉinio)



Vanteco

sonĝo estis forgesita.
 ĝin mi serĉas ĉe taglumo.
 majo ne estas revo,
 sed sentiĝas kiel vintro.
 ŝi vojaĝis foren,
 lasis al mi ĉambrojn sen sango kaj karno.
 la lampoj brilas,
 tamen ili ne kapablas hejti ŝiajn ombrojn.
 la suno daŭre vivas.
 pluvo priploras ĝin luno arka.
 ŝi forportis kun si la plejparton
 kaj mi suferas je malsato.
 ŝia valizo certe estas peza;
 en ĝi mia koro kuŝas.
 ne por gvati ŝiajn agojn,
 mi nur zorgas ke ŝi perdos vojon.
 danke al vento,
 tagnokte mi gustumas ŝian korp-aromon.
 tondroj. fulmoj.
 mia korpo jam senkora falis teren.
 en ŝiaj vestaĵoj mi trovis nur parfumon.
 kaj en la lito?
 haron buklan.
 mi ne lavas la littukon
 antaŭ ol ŝi rehejmiĝos.
 la pordoj kaj fenestroj restu nun fermitaj;
 sola mi flaras la resonojn
 de ŝiaj dolĉaj paŝoj.
 sonĝoj. eĥoj de kveroj kaj ĝemoj.
 akvo likis. polucio.
 la mamzonon mi ne povas ne purigi,

alie la sopiraj beboj ja naskiĝus
en la bovloj ŝvelaj.

Carlos Drummond de Andrade

(1902-1987)

Tradukis Ŭel (Brazilo)



Pluvoza Afero

Agace pluvo min igis anksia
 ĝis mi malkovris: pluv' estas Maria!
 Maria pluvis gute tie, ĉie
 trempante la dimanĉon ĝisebrie.

Miajn ostojn mokris, ŝi lasis min
 kiel teron pluvpluge for sen fin'.
 Mi senverda iĝis, iĝis tutkota...
 Maria pluvoplene eghipnota!

Sur min ŝi pluvis, sur ĉiun geston,
 penson, deziron, sonĝon kaj la reston.
 Pluvetpluvis ŝi ade, pluvis dike,
 kaj tage, kaj nokte, ĉiam... apike!

Min ne pluvu, Maria, pli ol limo
 de tujpluveto: pluv' apenaŭ timo.
 Ne min inundu per via likv' plasma,
 ne tia akvul' estu kataplasma!

Vane tion mi diris... ĉar Maria
 al petoj spite pluvis aluvia.

Kaj senkompate en duŝa rutino
 mian vojon banis en trista vino,
 kiu ne varmigas ĉar la pluveroj
 cindre mostas, ne el bonaj vinberoj.
 Pluvadema Maria, pluvadaĉa,
 pluviĝinta, fipluva, pluvoplaĉa!

Mi kriis: Haltu! kaj ŝi daŭre pluve
 frostajn flakojn teksis elmemefluve.
 Tiom Maria pluvis miadome,
 ke la torento kreskis pli ol home,

kaj river', aŭ mar', io kun profund'
 formis sin por mi, mi iris ĝis fund'.
 Kaj kiom pli min ondoj portis for
 Maria pli fontumis, ĝis furor',

kaŭzante, ke, sen multo, por eliro
 l' aferoj simple iris laŭ kirliro,
 kaj l' mondo jen humida, en sorbiĝo,
 sub perverse fatala pluvporiĝo.

Plej strangaj uloj laŭamasigadis
 en sama past' akvoza, kaj klamadis
 kontraŭ tiu stulta pluv', pluv' sen fin',
 en disfal', kvazaŭdiluva pluvin'...

Kantikoj porhaltigaj laŭtis ĉie,
 sed ho, des pli deliras akvo plie,
 kaj Maria, senbrideksploda krano,
 pli dilatiĝas en sia emano.

Ŝipoj sinkadas. La kvin kontinentoj
 jam subakviĝas kun ĉiuj la gentoj,
 kaj Maria plupluv'... Por ekvilibr'
 de fluidvanua homa tutfibr',

de l' ter' senforta antaŭ l' pluvatenc',
 la Dia kortuŝiĝis Providenc',
 kaj Di' kompatreagis per nur kri':
 Ne pluvu plu! - Kaj ŝi ne pluvis pli.

*Carlos Drummond de Andrade (okt 31-an
 1902 — aŭg 17-an 1987) Poeto, rakontisto kaj
 kronikisto. elstara figuro de brazila literaturo.*



*Pri la foto: Temas skulptaĵon sur benko de
 trotuaro de plaĝo Kopakabano (Rio) omaĝe al
 la poeto. Ĉirkaŭbrakas ĝin la tradukinto.*

Bohemio

[Kantteksto] Komponis **Charles Aznavour**



*Charles Aznavour,
 de armena deveno,
 naskiĝis en Parizo,
 maje 22-an 1924. Krom
 kantisto estas brila
 komponisto, kaj aktoro.
 Staras kiel unu el la*

plej konataj francaj kantistoj eksterlande.

Pri temp' parolas mi
 Kiun ne konis vi
 Malpli-ol-dudekjaraj
 Montmartre sen simil'
 Traburĝonis en lil'
 Ĝis fenestroj domaraj
 Kaj se nia loĝej'
 Por gear' nu je plej'

Tutmalindis al dank'
 Tie koniĝis ni
 Min trafis ĉia mank'
 Nudpozis vi por mi

 Bohemio, bohemio
 Por ni ĝi estis vivoflag'
 Bohemio, bohemio
 Kaj manĝ' je ĉiu dua tag'

Ĉe kafejoj ni du
 Staris kun asidu'
 Senfamuloj por gloro
 Eĉ ne gravis mizer'
 Nek malsatoinfer'
 Ni persistis kun voro
 Se por supoteler'
 Iĝis tolo moner'
 Ĝi, ne l' vintr', estis ben'
 Versojn ni kun humil'
 Do legis ĉe l' kamen'
 Ĝis pleno de trankvil'

Bohemio, bohemio
 Esprim' de belo estis vi
 Bohemio, bohemio
 Kaj ja geniaj estis ni

Kvazaŭ ul' en deĵor'
 Mi pro stabla labor'
 Noktojn spertis sendorme
 En retuŝ' al kontur'
 De sin', al koks-mezur'
 Ĝis ĝi staris konforme
 Kaj nur ĉe la maten'
 Fine povis ni jen
 Pensi pri kafotas'

Post elĉerp' jam la triv'
 En ni kun kia klas'
 Tuj cedis al la viv'

 Bohemio, bohemio
 Al dudekjaraj 'stas nur bril'
 Bohemio, bohemio
 El briz' ni vivis kun facil'

Nun jam dum la rondir'
 Grandas por mi la mir'
 Ĉe l' antikva adreso
 Ne restis iu spur'
 Ĉu de strat', aŭ de mur'
 De iama juneco
 Por mi vanas l' esper'
 Ke de l' atelier'
 Iĝos ombro ekzist'
 Laŭ sia novfason'
 Montmartre ŝajnas trist'
 Ne lilas plu la ton'

Bohemio, bohemio
 Ĝi estis fol', junec' kaj ĝu'
 Bohemio, bohemio
 Jam ĝi nenion sencas plu

Elfrancigis



Ŭel (Brazilo)



Vejdo (Ĉinio)



Azeno en puto

(limerikoj)

I.

Iutage enfalis azeno
en puton de akva malpleno.
Ĝi raŭke ĝemploris,
kaj savon deziris
el vere mizera ĉagreno.

II.

La mastro kompaton ekhavis,
al ĝin ja la savo tre gravis.
Cerbumi li penis,
ide' ne alvenis.
Profundo de put' lin malravis.

III.

Rezigne decidis per tero
plenigi li puton kun kvero:
en paco, vi kara
jen restu senfara,
mi faras tion sen prefero.

IV.

Do, oni enĵetis ŝovele
la grundon sur beston jen splene.
La mastro lamentis,
malĝojon li sentis:
Ĝi ne plu servadis fidele.

V.

L' azeno mirige ne ploris
ĉagreno pro morto jam foris.
Ĉu pasis la krizo?
Ho, kia surprizo!
Ekmiro la mastron forvoris.

VI.

Li ŝovis la kapon diskrete
por vidi, ĉu io kviete
okazas enpute
sencie entute.

Ha, kion ĝi faras konkrete!


VII.

Forsvingis ĝi grundon plenforte

de dorso kaj staris komforte
tavol' sur tavolo
jen firme kun volo
sur teron ĵetitan ĝismorte.

VIII.

Leviĝis ĝi lante fiere
ĝis rando de l' puto libere.
La mastro mirplene
laŭdetis senĝene:
“Vi saĝa stultulo ja vere!”



Ĉineske

Vejdo (Ĉinio)

Verda Motoro

okaze de 60-jariĝo de ĈEL*

—laŭ ĉineska skemo Manjianghong**

Ses dek jaroj
forpasis
kun verda glor'.
Jubile'
celebrata
en nuna hor'
ĝojigas geadeptojn.
Manklakoj, ĝoja rumor',
sub flago
verdstela ĵuro
jen el kor'.

Vi jame
la motor'
fariĝis

per labor'
la persistema.
Penu en ĥor'
ĉinaj samideanoj
junaj, oldaj kun fervor'
por nia
afero verda
al flug-sor'.



*ĈEL: Ĉina Esperanto-Ligo

**Manjianghong (rivero plenruĝa): ĉina fiksfirma poemo el du strofoj kun po 11 versoj de 434,344,77,353 / 33,33,54,77,353 silaboj respektive, laŭ rimaranĝo xxa,xxa,xa,xxa / xa,xa,xa,xa,xxa (x = senrima)

Amo sen vortoj

dediĉe al Patrino Tago 2011

—laŭ ĉineska skemo Fengrusong*

I.

de beba unua kri'
kun zorgemo vi
flegadas min senĉese
silente
sed kun konsci'
pri mia plenkresko
en saniga medi'


de mia unua sci'
ĉe sojl' de soci'
vi silente observas
jen sen ajna apati'
mian kondutadon
per milda am-magi'

II.

vi ĉiame en silent'
ĉe ĉiu event'
sur mia viva vojo
rigardas
jen kun atent'
miajn progresojn kaj
falojn indajn je pent'

kun profunda sentiment'
kaj buked-prezent'
mi dankas al vi patrin'
per sincera kompliment'
por granda senvortec'
en ĉi ĝoja moment'

*Fengrusong (vento inter pinoj): ĉina fiksfirma poemo el du strofoj kun 7 kaj 6 versoj respektive de 7,5,734,66 / 7,5,77,66 silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,xxa,xa /a,a,xa,xa (x=senrima)



Eĉino (Ĉinio)



IEK 2011

—laŭ ĉinesko Manjianghong

(2011-04-18/23)

Kurantjara

IEK

en Ĉinio.

Rekorda

kre' en ĝia

historio.

Interkona Vespero:

Kantoj, danc' kun gracio,
donaco
akrostika al
podio.

Programa
vario.
Prelega
serio
pri doktrinoj kaj
religio.
Por
lanĉa ceremonio.
Al roman'
premio!

Stafeto laŭ Santaici*

Santaici (Tri terasoj): ĉina fiksfirma poemo el kvar versoj de ses silaboj kun krucrimo.

Cindy Mckee (Usono)



Ripoztago

Dimanĉo demande
oazmiksas mondojn
hom- kaj herb-faritajn.
Lukros lund' respondojn.

Veĵdo (Ĉinio)

Mevo

Alte ĝi rondflugas
super bluaj ondoj,
jen al maro suben
tranĉas ĝin per tondoj.

Viktoro (Ĉinio)

Laden mortis

Mortis li kun mavoj
profunden en ondojn.

Ĉu teror' seniĝas?
volas ni respondojn.

Cindy Mckee (Usono)

Agnosko de normaleco

Arĝenta filiko
al planto verdblonda
blanke riverencis
per nuanco fronda
(mi legis la figurajn difinojn de 'blanka' en PIV)

Venĝo venĝas venĝon - bin Laden

Kontento venis per
venĝplena respondo.
Sed la venko estas
nur venena rondo.

Cezar (Germanujo)



Obama kaj Osama

Per terora murdo
mortis teroristo.
Estis "nur" Osama,
laŭ usona listo.

Eto (Ĉinio)

Kia mondo!

Knab' senĝene vagas
kvazaŭ vagabondo
sen cerbum' zorgema
pri la nuna mondo.

Brulas fajr' milita
Ĝuste ĉe la fronto.
Li sentime iras
Ĝis tumulto rondo.

Ve, lin trafas kuglo
al lia renkonto.

Li ne scias ĉe mort'
tion. Kia mondo!

Lily (Ĉinio)

Blanka edziĝo
amata edzino
mia kun har' en blond'
min evitas dorme
pro la seka am-font'

mia kaco vane
staras kun granda hont'
mizere kaj pete
eĉ por sek-frota sond'

mi altiras forte
ŝin malgraŭ malvolont'
ho ve, ŝi rezistas
per la dorsa renkont'

tagon post tago min
trafas nea respond'
ŝia kaj mi vere
dronas en desapont'

min atakas pike
la seks-impulsa ond'
ĉu mi devu tiri
min el blanka seks-rond'?



Viktoro (Ĉinio)

Revo

Jam dum dudek jaroj
vi kaj mi en renkont'
rendevuas kare

dolĉe sen ajna hont'.

Sed dumtage ĉio
je mia desapont'
malaperas tute
kiel mortinta ond'.

Deziregas mi ja
ke la ekstaza songĝ'
daŭru kiel inte
ĉiuhore en ont'.



Vejdo (Ĉinio)

Larmanta glacimonto

—laŭ ĉineska skemo Zhuzhici*

Eklarmas glacimonto.
Degelis ĝia fronto
majesta kaj impona
je ĝia disaponto.

Suna arda lumgloro
brulvundas per doloro
okulojn ŝiajn belajn
ĉiam en ĉiu horo.

La glaci-akvo lante
fluas foren lirlante
al la maro sala
senĉese konstante.

Malkaŝas ŝia larmfluo
la misteron sub volb-blu'.
Ŝi jam perdis majeston

en la polusa situ'.

Abomeninda varmo
de fluorida svarmo
rapidigas degelon
glacian per malĉarmo.



Zhuzhici (Bambuoj): ĉina fiksforma poemo el kvar versoj de sep silaboj laŭ rimaranĝo a,a,xa (x=senrima)

Eto (Ĉinio)

Sopire al Ann

—laŭ ĉineska skemo Niannujiao*

For en nordo
ŝi kara
ĝenas min per sopir' .
Ŝiaj rido
kaj petol'
ronĝas min per disŝir' .
En mia mens'
ŝi turniĝas
ĉiam kun altir'
neviŝeble
eĉ per fortega ŝmir' .

Ŝi ofte vekas min
en mia imag'
per am-aspir'
necedeme
kokete.
Ŝia trankvila spir'
sentigas min
rave fascina
eĉ en delir'
mia sonĝa

kune kun ve-suspir' .

Niannujiao (ĉarma kantistino): ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po 11 versoj de 436, 436,445,46 / 654,436,454,46 silaboj, laŭ rimaranĝo xxa, xxa,xxa,xa (x = senrima)

Anteo (Ĉinio)

Mi estas verkisto feliĉa



tie nun mi loĝas kune kun la edzino kolektas ĉifonojn

en la lastaj dek jaroj mi mempublikigis miajn dek librojn po 10000 ekzempleroj en papera versio. dikajn k belajn. altkvalitaj ĉiam estas la paperoj sed iom bedaŭrinde la tekstoj ne tiom kontentigas.

ĝis hodiaŭ krom mi mem neniu legis miajn librojn. ili okupis mian ĉambron grandan. antaŭhieraŭ matene geamikoj sciigis al mi ke nun oni legas nur e-librojn. mi subite ekkomprenis kial neniu aĉetis miajn librojn. kiel fari? al kiuj mi sendas tiujn librojn? ho, la sendokosto estas pli altapreza ol la libro.

mi gapis al la plafono k al la planko de la granda ĉambro. vidiĝis nur muŝoj. sed la muŝoj ne interesiĝas pri miaj libroj, eĉ pornografiaj.

mi aprezis ĉe la fenestro orientanta al la kvartala vojeto la kovrilojn kun nudaj viroj. kvankam mi tute ne estas gejo, tamen tiam ia impulso okazis en la kaĉujo.

mi volis fari ion.

...

kiam mi finis la aferon sur la librojn k diris "fik!" k turnis mian kapon al la vojeto, virino ridetis al mi.

mi koleretis kontraŭ ŝi:
— kial vi min gvatis?
— kio?
— kial vi staras sur tiu ĉi vojeto kie ordinare neniuj troviĝas?
— vi ne scias ke mi estas via najbaro k hokĉifonistino,ĉu?
— ne.
— pro kio vi koleras?
— tiuj libroj!
— kial? belaj ili estas.
— ĉu vi ilin ŝatas?
— jes. certe.
— do forprenu ilin.
— mi ilin aĉetas.
— kio?
— mi aĉetas ilin kiel rubojn.
— bonege!
...
mi helpis ŝin transporti la librojn al sia portempa tenejo.
dum la laborado ni interbabilis multe.
ŝi konis de longe ke mi estas verkisto k mi havis multajn librojn en la ĉambro. k mi eksciis ke ŝi estas vidvino k ke ŝia edzo frezeniĝis k antaŭ tri jaroj mortis pro tio ke li legis tromulte da rubaj libroj kiuj similas al la miaj.
— ho,kompatinda!
mi veis.
— kiu?
— via edzo.
— jes,li estis.
— ĉu ne vi?
— mi? kial?
— neniam legu miajn librojn!
— ne. ne.
— kial ne?
— viaj libroj en tiu lingvo kiu estas ekster mia scio.
— k la ilustraĵoj?
— aĥ,mi povas spekti pornografiajn filmojn en interreto.
— ve,kompatinda?

— kiu?
— vi.
— kial?
— sola virino bela.
— sola jes;bela ne.
— kial vi ne reedziniĝas?
— al kiu?
— eble unu el viaj kolegoj?
— kolego?
— jes,kolego via.
— se ankaŭ li mortus pro la libroj...
— estas tro multe da verkistoj kiel mi,ĉu?
— en nia kvartalo troviĝas 1001. sen ili ni ne povus vivi.
— ni?
— ni gehokĉifonistoj.
— kiom da vi?
— 1000!
— kial 1000?
— mia edzo mortis.
— ooooooooo,tiel.
— do mi povus vivteni vin per miaj libroj.
— vi povas.
— nun?
— jes.
— per kio?
— vendi viajn librojn en la retejo amazon.
— kiel vi scias tion?
— kindle.
— kindle?
— multaj homoj vendas al ni la legilon de amazon kiel rubon.
— kial?
— ĉe ni oni povas aĉeti k elŝuti nenion ĉe amazon.
— kio okazas?
— la mesaĝoj en la retejo estas okulmasaĝaj mensogoj.
— o...
kiam mi ree o—is kun la buŝo ege malfermiĝinta,ŝi ŝtopis mian konsternon per sia lango.
feliĉa estas mi.

morgaŭ ni, ŝi k mi, funkciigos retejon por vendigi e-librojn.

Maupassant (1850-1893)



LA MURDINTO

La kulpulo estis defendita de tre juna advokato, unu komencanto kiu tiamaniere parolis :

– La faktoj estas neneigeblaj, sinjoroj la ĵurianoj. Mia kliento, honesta viro, neriproĉebla oficisto, milda kaj timida, murdis sian mastron pro kolera gesto, kiu ŝajnas nekomprenebla. Ĉu vi volas ebligi al mi, ke mi faru la psikologion de tiu krimo, se mi povas tiamaniere paroli, nenion malgravigante, nenion senkulpigante ? Poste vi juĝos.

Johano-Nikolao Luĝero estas la filo de tre honorindaj geuloj, kiuj faris lin kiel simpla kaj respektema homo.

Jen lia krimo : la respekto ! Jen sento, sinjoroj, kiun nun ni apenaŭ konas, kies nur nomo ŝajnas ankoraŭ ekzisti, kaj kies tuta potenco malaperis. Necesas viziti iujn modestajn familiojn, kiuj vivas ekster sia tempo, por ankoraŭ trovi tiun severan tradicion, tiun religion de la respekto aŭ la homo, de la sento aŭ la kredo, kovritaj de sakrala karaktero, tiun fidon kiu toleras nek la dubon, nek la rideton, nek la komencon de suspekto.

Oni povas esti nur honestulo, vera honestulo, kun la tuta forto de tiu vorto, kiam oni nur estas respektoplena. La homo kiu respektas, havas la okulojn fermitajn : ĝi kredas. Ni la advokatoj, kiuj rigardas la mondon kun malfermegaj okuloj, kiuj vivas ĉi tie, en tiu juĝejo kiu estas la kloako de la socio, en kiu finalvenas ĉiuj malnoblaĵoj, ni kiuj estas la konfidenculoj de ĉiuj hontindaĵoj, ni la sindonaj defendistoj de ĉiuj homaj kanajlaĵoj,

ni la subtenoj, por ne diri la subtenantojn, de ĉiuj fiuloj kaj ĉiuj fiulinoj, de la princoj ĝis la ŝtelvaguloj, ni kiuj akceptas kun indulgo, komplezo, afabla bonvolo ĉiujn gekulpulojn por defendi ilin antaŭ vi, ni kiuj, se ni vere amas nian metion, taksas nian advokatan simpation laŭ la graveco de la krimego, ni ne plu povas havi respektan animon. Ni tro vidas tiun riverregon de korupto, kiu flutransportas tiel bone Potencajn ĉefojn kiel plej aĉajn ŝtelistojn, ni tro scias kiel okazas ĉio, kiel oni donas ĉion, kiel oni vendas ĉion : postenojn, funkciojn, distingajojn, ĉu rekte aĉetante ilin per iom da oro, ĉu lerte interŝanĝe ilin kun titoloj kaj akcioj en la industriaj entreprenoj, aŭ ankoraŭ pli simple kontraŭ kiso de virino. Nia devo kaj nia profesio trudas al ni, ke ni konu ĉion, suspektu ĉiujn, ĉar ĉiuj estas suspektindaj ; kaj ni restadas miregataj, kiam ni troviĝas fronte al viro kiu, kiel la murdinto sidanta antaŭ ni, havas la religion de la respekto sufiĉe potenca, por ke li fariĝu martiro pro ĝi.

Ni, sinjoroj, ni traktas kun la honoro, kiel ni traktas kun la zorgoj de pureco, abomenante la malnoblecon, per sento de persona digneco kaj orgojlo ; sed ni ne havas, funde en la koro, la saman krudan, denaskan, blindan fidon, kiel tiu viro.

Permesu al mi, ke mi rakontu al vi lian vivon.

Li estis edukita, kiel antaŭe oni edukis la infanojn, tio estas duone partigante ĉiujn homajn agojn : iu flanke ĉio kiu estas bone, alia flanke ĉio kiu estas malbone. Oni montris al li la bonon per nerezistebla aŭtoritato, kiu distingigis al li tiun ĉi de la malbono, kiel oni distingigas la tagon kaj la nokton. Lia patro ne apartenis al la gento de la superaj spiritoj, kiuj taksante altege la aferojn, vidas la fontojn de la kredoj, kaj rekonas la sociajn neprajn bezonojn, el kiuj naskiĝis tiuj distingoj.

Do li kreskis, religia kaj bonfida, entuziasma kaj mensbarita.

En lia dudek-dua jaro, li edziĝis. Oni edziĝigis lin kun kuzino, edukita kiel li, simpla kiel li, pura kiel li. Li havis la netakseblan bonŝancon edziĝi kun honesta virino, kun virta animo, tio kiu estas tre malofta, kaj tre respektinda en nia mondo. Li adoris sian patrinon, kun tiu respekto kiu ĉirkaŭas la patrinojn en la patriarkaj familioj, kun tiu profunda kultado kiun oni rezervas al la diaĵoj. Li transigis al sia edzino iom de tiu religio, apenaŭ malgravigita de la geedzaj intimecoj. Kaj li vivis en plena nesciado de la malsincereco, en stato de obstina honesteco, kaj trankvila feliĉo, kiuj igis lin kiel aparta estulo. Ĉar li trompis neniun, li ne imagis, ke oni povu trompi lin.

Kelka tempo antaŭ lia edziĝo, li estis dungita kiel kasisto ĉe S-ro Langlo, kiu antaŭ nelonge estis murdita de li.

Ni scias, sinjoroj la ĵurianoj, dank'al la atestoj de S-ino Langlo, de ŝia frato S-ro Pertuiso, asociito de ŝia edzo, de la tuta familio kaj ĉiuj superaj oficistoj de la banko, ke Luĵero estis modela oficisto, modelo kiel honesteco, obeemo, mildeco, respekto rilate al siaj ĉefoj, kaj kiel akurateco.

Cetere oni traktis lin kun la meritata konsidero de lia ekzempla konduto. Li kutimis al tiu konsidero, kaj al tiu speco de respekto, kiu S-ino Luĵero montris al li, kaj kies ĉiu atestas.

Ŝi mortis pro tifoidafebro, kiu forportis ŝin en kelkaj tagoj.

Sen ia dubo, li sentis profundan doloron, sed kvietan kaj malvarman doloron, propran al la metodaj koroj. Oni vidis, pro lia paleco kaj la difektŝanĝo de liaj vizaĝaj trajtoj, ĝis tiagrade li estis vundita.

Tiam, sinjoroj, ja natura afero okazis.

Tiu viro estis edziĝinta dum dek jaroj. De antaŭ dek jaroj, li estis kutimiĝinta ĉiam senti virinon apud li. Li estis kutimiĝinta al ŝiaj zorgoj, al tiu familia voĉo kiam oni eniras, al la vespera adiaŭ, al la matena saluto, al tiu

milda robobruo tiel kara al la virina gento, al tiu kareso jen amora kaj jen patrina, kiuj leĝerigas la ekzistadon, al tiu amata ĉeesto kiu igas la horojn pli rapidajn. Eble li ankaŭ estis kutimiĝinta al la materialaj tablodorlotajtoj, al ĉiuj tiuj prizorgemoj, kiujn oni ne sentas, kaj fariĝas iom post iom nepre necesaj. Li ne plu povis vivi tute sola. Tiam, por pasigi la longdaŭrajn vesperojn, li kutimis iri sidiĝi dum unu aŭ du horoj en najbaran biertrinkejon. Li trinkis bierglason, kaj restis tie, senmova, sekvante per senatenta okulo la bilardobulojn, kiuj kuris unu post la alian sub la fumo de la pipoj, aŭskultante nepensante la disputojn de la ludantoj, la politikajn diskutojn de siaj najbaroj, kaj la ekridojn kiujn, iafoje peza ŝerco alvenante de la fundo de la ĉambro, sprucigis. Fine, ofte li endormiĝis pro la laceco kaj la enuo. Sed funde de lia koro, kaj funde de lia karno, la nerezistebla bezono de koro kaj virina karno kreskis iom post iom ; kaj, ne pensante pri tio, ĉiuvespere li iom alproksimiĝis al la verŝtablo, kie tronis la kasistino, malgranda blondulino, nerezisteble altirata al ŝi, ĉar ŝi estis virino.

Baldaŭ ili interbabilis, kaj ĝuante tre agrablajn momentojn li ekkutimis travivi apud ŝi ĉiujn siajn vesperojn. Ŝi estis gracia kaj komplezema, kiel konvenas en tiuj komercoj, kie la rideto estas natura, kaj ŝi amuziĝis, kiel eble plej ofte, replenigi lian glason, tio kiu ne estis malbona por la aferoj. Sed ĉiutage, Luĵero pli kaj pli korinklinis al tiu virino, kiun li ne konis, kies li nesciis la tutan ekzistadon, kaj kiun li amis, nur ĉar li ne vidis alian.

La etulino, kiu estis ruza, baldaŭ ekvidis ke ŝi povus profiti el tiu naivulo, kaj ŝi serĉis la plej bonan manieron ekspluadi lin. La plej trafa, estis certe sukcesi, ke ŝi edziĝinu kun li.

Tion ŝi facile sukcesis.

Ĉu mi bezonas diri al vi, sinjoroj la ĵurianoj, ke la konduto de tiu knabino ne estis plene ekzempla, kaj ke la geedziĝo, anstataŭ

bridi ŝiajn konduktajn misfarojn, male ŝajnis igi ilin ankoraŭ pli senhontaj ?

Per natura ludo de la virina ruzeco, ŝi ŝajnis havi plezuron adulti tiun honestan viron kun ĉiuj viroj de lia oficejo. Mi ja diras : kun ĉiuj. Ni havas leterojn, sinjoroj. Baldaŭ tio fariĝis publika skandalo, kiun nur la edzo, kiel ĉiam, nesciis.

Fine tiu diboĉulino, pro intereso facile konceptebla, delogis la filon de la mastro, iu dek-naŭjara junulo, kaj sur la menso kaj la sencoj de kiu, ŝi rapide havis bedaŭrindan influon. S-ro Langlo, kiu ĝis tiam, pro boneco kaj amikeco al sia oficisto ignoris la miskonduton de lia edzino, vidante sian filon en ŝiaj manoj, mi devus diri inter la brakoj de tiu danĝera estaĵo, ekkoleris, ja komprenebla reago.

Li malpravus tuj alvoki Luĵaron, kaj paroli al li subminace de sia patra indigno.

Nun restas al mi, sinjoroj, ke mi nur legu al vi la rakonton de la krimo, farita de la lipoj mem de la mortigaĵo, kaj kolektita de la enketa responsulo.

« Mi ĵus eksciis, ke mia filo donis, la antaŭtagon mem, dek mil frankojn al tiu virino, kaj mia kolero superis mian saĝon. Kompreneble, neniam mi suspektis la honorindecon de Luĵaro, sed iuj blindiĝoj estas pli danĝeraj ol kulpoj.

« Do mi alvokigis lin apud mi, kaj mi diris al li, ke je mia granda bedaŭro, mi estis devigata maldungi lin.

« Konsternata, nenion komprenante, li restis staranta antaŭ mi. Fine li vivmaniere demandis al mi klarigojn.

Mi malakceptis pravigi min, asertante ke miaj kialoj estis tute privataj. Tiam li kredis, ke mi suspektis lin de malhonesteco, kaj tre pala, li petegis min, minacordonis al mi, ke mi klariĝu. Fiksita sur tiu ideo, li estis forta kaj arogis al si la rajton laŭte paroli.

« Ĉar mi ĉiam silentis, li ofendis kaj insultis min, li atingis tiagrade de incitegiĝo, ke mi timis molestadojn.

« Nu, subite, pro ofenda vorto kiu trafis min plenkoren, mi plenvizaĝe ĵetis al li la veron.

« Li restis staranta dum momenteto, rigardante al mi kun konfuzitaj okuloj ; poste mi vidis lin ekpreni sur mia skribotablo la longan tondilon, kiun mi uzas por demarĝenigi iujn registrojn, poste mi vidis lin fali sur min kun la brako levita, kaj tiam mi sentis eniri ion en mian gorĝon, ĉe la supro de la brusto, ne suferante nenian doloron. »

Jen, sinjoroj la ĵurianoj, la simpla rakonto de tiu murdo, kion plie diri por lia defendo ? Respektinte sian unuan edzinon kun justeco, li respektis la duan kun blindeco.

Post mallonga konsilio, la juĝato estis senkulpigata.

La 1an de novembro 1887

Esperantigis



Noël Lecomte
(Francujo)



Eldonas Redakcio de *Penseo*
Ĉefredaktoro: s-ro Yida Wei (Vejdo)
Adreso: No.-3-2 de la 5-a etaĝdomo
de No. 19, Wujiang St., Jiangbei Distrikto,
Chongqing, 400020, Ĉinio
Tel: (023) 67095890 (hejme)
Retadreso: vejdo@163.com

Ĉiujn kontribuojn al la ĉefredaktoro.

Por legi pasintajn numerojn de *Penseo*, vin turnu al www.elerno.cn/penlisto.htm aŭ

<http://gazetejo.org/eo/penseo>

